Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 38 - trimonata
08/1

IPR

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
Jozefo Németh (red.)
Luiza Oberrauch Madella
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Jean-Pierre Boulet
Aida Cizikaite
Georges-Henri Clopeau
Daniela Danieli
Leo De Cooman
Ellen Eddy
Enrique Fremont
Maritza Gutierrez
Zsofia Korody
Ilona Koutny
Katalin Kovats
Stefan MacGill
Maria Majerczak
Lajos Molnar
Piotr Nosek
Radojica Petrovic
Claude Piron (+)
Graziano Ricagno
Jeremie Sabiyumva
Josef Schiffer
Ermanno Tarracchini
Dietrich Weidmann



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Radojica PETROVIĆ: *La perspektivoj en 2008* 3
Ilona KOUTNY: *Instruado de vortoprovizo* 4
Graziano RICAGNO: *Malrapida tradukanto* 11
Georges-Henri CLOPEAU: *Nur E-o povas savi la lingvan diversecon* 15
Lajos MOLNÁR: *Kiel mi perdis 5 jarojn el mia esperantista vivo?* 18
Piotr NOSEK: *Internacia supera kurso de E-o en Krakovo* 22
Interkultura dialogo en Hispanio (E. TARRACCHINI k.a.) 24
El landoj kaj sekcioj (BI, FR, DE, HU, CU, CH, US) 27
Reago de Josef SCHIFFER (al la artikolo de Rob MOERBEEK) 32
Por via notlibro (K.KOVÁTS, J-P.BOULET, S.MACGILL, A.ČIŽIKAITĖ) 33
Atentigo pri medikamento (intervjuo de DANIELI kun TARRACCHINI) 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Radojica PETROVIĆ, *Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radp@ptt.yu>.* Kunordigado, eksteraj rilatoj, la projekto InterKulturo.

Vicprezidanto: Zsófia KÓRÓDY, *Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983, <zsofia.korody@esperanto.de>.* Instrukapabligado kaj edukaj centroj.

Sekretario: Atilio ORELLANA ROJAS, *Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando. Tel. (+31 70) 3556677, fakso: (+31 70) 358 4422, <atilioorellanarojas@gmail.com>.*

Estrarano pri financoj: Sjoerd BOSGA, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel. (+46 21) 41 70 45, <sjoerd@esperanto.se>.* Administra sistemo.

Vicsekretario: Mihai TRIFOI, *Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, Rumanio. Tel.(+40)267-365319,<trifoi@honoris.ro>*. Lerneja agado.

Estrarano: Aida ČIŽIKAITĖ, *Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, Litovio. Tel. (+370) 37 793408. <aidute@mail.lt>*. Konferencoj. Scienca agado.

Estrarano: Yas KAWAMURA, *13-8 Nakayata-cho Babanomizo Kameoka-si, Kyoto-fu, JP-621-0855, Japanio. <esperanto@d0y0b.com>*. Azia agado.

La nunan numeron ni sendis al la presejo 29 januaro 2008, redaktofino por la sekva numero 15 aprilo 2008.

Sur la titolpaĝo: *Venas novaj e-istoj de la juna generacio. Anna Gwizdoń kaj Roberto Kołodziej estas inter la unuaj ricevintoj de la nova Atestilo pri E-lernado de Jagelona Universitato, en majo 2007. Legu pli sur p. 22-a!*

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford; AdE[1]

***Vicprezidanto*: Detlev Blanke**, Germanio, Prezidanto de la Societo pri Interlingvistiko

***Membroj*:**

Vera Barandovská-Frank, Germanio, Universität Paderborn; AIS[2] San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]

Probal Dasgupta, Barato, University of Hyderabad; AdE[1]

Michel Duc Goninaz, Francio, Université de Provence; AdE[1]

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas

Wim Jansen, Nederlando, Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE[1]

Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu; AdE[1]

Mauro La Torre, Italio, Università degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwersytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia Universitato de Paranao; AdE[1]

Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, Magyar Tudományos Akadémia, Nyelvtudományi Intézet

***Sekretario:* Aida Čižikaitė**, Litovio; estrarano de ILEI

[1] AdE – Akademio de Esperanto

[2] AIS – Akademio de la Sciencoj, San Marino

La perspektivoj en 2008

Du gravaj eventoj en E-pedagogia kampo markis la finon de la pasinta jaro:

- esperantigo de la Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER), kiu plifortigas la inspiron por novaj aliroj al instruado, lernado kaj ekzamenado de Esperanto
- kvinjariĝo de la multlingva retlernejo kaj retkomunumo de E-o *lernu!*, kiu estigas ĉiam pli da novaj e-istoj ĉie en la mondo, precipe inter la junuloj.

La du eventoj reatestas la emon kaj kapablon de E-o adopti kaj adapti aktualajn atingojn de lingvopedagogio kaj instruteknologio. Pli grave, ili atestas la perspektivojn de Esperanto-instruado en la jaro 2008 kun la kernaj taskoj:

- KER-bazita ekzamensistemo;
- formado de E-instruistoj kaj ekzamenantoj;
- integrado de lernado de E-o en oficialajn eduksistemojn.

La agadbazon faras: Lingvolanĉilo, Interlingvistikaj studoj en Poznań, E-studoj en ĉinaj kaj aliaj universitatoj, AKEL-ecaj projektoj, la kampanjo de korespondaj kursoj en Afriko, seminarioj en Herzberg, kaj multaj aliaj agadoj kaj iniciatoj.

Sur tiu vojo, multajn sukcesojn kaj agadplezurojn al ĉiuj!

Radojica Petrovič

Instruado de vortoprovizo

de Ilona KOUTNY, ***Interlingvistikaj Studoj, UAM, Poznań (PL)***

1. Enkonduko

Lingvolernado kaj -instruado estas kompleksaj procezoj, kiuj ampleksas lernadon kaj instruadon de elparolo, vortoprovizo, gramatiko, komunikado kaj de lingvouzo. Ne indas kaj preskaŭ ne eblas instrui nur iun terenon, eblas nur meti la emfazon al iuj el tiuj flankoj. Preferindas instrui vortoprovizon kaj gramatikon en kunteksto, en frazoj uzeblaj en komunikado. Bona lingvoscio necesigas **kompetenton en ĉiuj tiuj terenoj**.

En la komenco la gramatiko povas ricevi pli grandan emfazon depende de la lingvo, kvankam la komunika instruado provas eviti tion. La lernado de vortoj akompanas la tutan lingvoalproprigon, eĉ post la formala lernado ni riĉigas nian vortoprovizon. Por tiu celo **vortaroj** estas nemalhaveblaj.



Diplomito kaj profesoroj ĉe UAM (Ilona Koutny la dua de maldekstre - NdlR)

La tradiciaj alfabetaj dulingvaj vortaroj, aŭ en progresa nivelo la unulingvaj vortaroj, disponigas la signifojn de serĉataj unuopaj vortoj kaj esprimoj necesaj ĉe kompreno, kreo aŭ traduko de teksto. Tamen la tipa lingvolerna situacio rilatas al iu **kunteksto**: – teksto kaj dialogo pri iu situacio en lernolibroj; – pretiĝo por la ekzamentemoj aŭ – pli poste en realaj situacioj, kiam iu ekhavis korespondanton kaj volas prezenti siajn familion kaj ŝatokupon kiel ĝardena laboro; aŭ venos eksterlandaj gastoj al ni kaj ni montros nian loĝejon al ili, i.a. kiel uzi la banĉambron, se ili tranoktos ĉe ni ktp.

Laŭtema vortaro multe pli utilas en tiuj situacioj, ĉar ĝi tuj disponigas la vortojn kaj esprimojn necesajn en iu tereno de la vivo. En la sekvaj paĝoj, kelkaj taskotipoj estos prezentataj por instrui la vortoprovizon kaj la laŭtemaj etvortaroj de la aŭtoro[1], kreitaj speciale por instruceloj en postkomenca nivelo, ilustros kiel temvortaroj subtenas la lernadon de vortoprovizo.

2. Vortoprovizo en diversaj niveloj

Instruado de vortoprovizo kutime okazas **spirale kaj laŭ temoj**, ankaŭ la modernaj lernolibroj estas tiel strukturitaj. Estas pli facile rememori vortojn, se ili aperas en sia natura kunteksto, kaj tuta grupo da vortoj inter si ligitaj semantike nature enkapiĝas tiel. Tio des pli validas por esperanto, kie la vortoj de iu temo ofte ankaŭ morfologie estas kunligitaj (ekz. *lerni, lernejo, lernanto, lernema, lerninda*). Ripetoj necesas por la daŭra enmemoriĝo. Do reveno al la samaj vortoj, sed en pli vasta aŭ en iom alia kunteksto servas tiun celon.

La plej gravaj kaj oftaj vortoj de ĉiutagaj situacioj kaj bazaj esprimoj de konversaciaj temoj aperas jam en la komenca fazo. La pli altaj niveloj baziĝas sur ili, tiuj estas pli vaste disvolvataj tie, ekz.:

Baza nivelo: bazaj vortoj de familio, loĝado, manĝado, vestoj, veturado ktp.

Meza nivelo: pli vasta familio (borilatoj kaj prarilatoj), geedziĝo kaj eksgeedziĝo, eduko de infano; loĝejotipoj kun hejtado, lumigo kaj aparatoj, avantaĝoj kaj malavantaĝoj de loĝado en urbo kaj en vilaĝo; vasta gamo de fruktoj kaj legomoj, pretigo de manĝaĵoj kaj iloj por tio ktp.

[1] Vd recenzon pri ili en IPR 2006/2, p. 25-27. – NdlR


Supera nivelo: generacia problemo, familiplanado, kreski en unugepatra familio, heredado; situacio de loĝejoj, kvartaloj en iu urbo, senhejmuloj; sana manĝado, vitaminoj kaj dietoj ktp.

La komunika instruado eliras el realsimilaj situacioj, la instruisto ludigas kaj diskutigas la partoprenantojn de la leciono. Temvortaro tion subtenas disponigante la necesajn vortojn kaj esprimojn. Ĝi ebligas ankaŭ laboron pri la leksiko (trovon de sinonimoj, vortnestoj ktp). La situacio kaj la vortaranĝo en la temvortaro helpas kompreni la konkretan signifon de vortoj, ja la kunteksto unusencigas la vortojn. La aliaj signifoj restas preterlasitaj, pro tio la tradiciaj dulingvaj vortaroj daŭre necesas por pli profunda kompreno de vortosignifoj.

3. Taskoj por riĉigo de vortoprovizo helpataj de temvortaro

Por trakti la temon **lernado,** kelkaj taskotipoj por progresa nivelo estos prezentataj (referenco al la similtitola ĉapitro de la Angla-esperanta-hungara etvortaro pri lernado kaj laboro, Koutny 2002).

- Kolekto de la ĉefaj terenoj de la temo kune kun la gelernantoj kaj **grafika prezento** sur la tabulo. Tio samtempe **aktivigas la ĉefajn vortojn de la temo**, jam parte antaŭe lernitaj:



- Priparolo de kelkaj terenoj en formo de **demando – respondo**, povas okazi para laboro antaŭ la respondo kun esploro de la temvortaro, ekz.:

  Kiujn tipojn de lernejoj vi konas?
  Kion faras instruisto dum leciono?
  Kiuj studobjektoj estas en kutima bazlernejo?
  Kiuj loĝas en studenthejmo?
  Kiuj universitataj gradoj kaj titoloj ekzistas en via lando?

- **Laboro pri la leksiko**: individua serĉado kaj poste komparo de

  vortnestoj kiel
  LERN: lernegi, lerneti, ellerni, lernadi, relerni, kunlerni, memlerni, lernigi;
  lernanto, gelernantoj, ekslernanto, kunlernanto, lernantaĉo, memlerninto, samlernejano;
  lernejo, lernoĉambro, lernejestro, lernaĵo, lernilo, lernilujo;
  lernofako, lernolibro, lernprocezo, postlerneja okupo;
  lernebla, lerninda, lernenda; lernema, lernemulo, lerniva.

Tio aktivigas la uzon de afiksoj. Ĉe ne evidentaj vortoj necesas klarigo fare de gelernantoj, ev. traduko al la gepatra lingvo kaj atentigo de instruisto pri eblaj misuzoj (ekz. kaze de *ellerni, lernejo – lernoĉambro*).

sinonimoj kiel
LERNI: studi, alproprigi, enkapigi, enmemorigi.
INTELIGENTA: saĝa, klera, edukita, talenta, genia.
AKTIVIGI: agigi, laborigi, kuraĝigi, instigi, sproni, stimuli.

Necesas trejni la partoprenantojn pri la fleksebla uzo de la lingvo kaj konsciigi ilin, ke ankaŭ en esperanto ekzistas sinonimoj kaj eĉ antonimoj malgraŭ la konsekvenca uzo de la prefikso *mal*.

antonimoj kiel
aktiva – pasiva, severa – permesema, deviga – elektebla (studobjekto).

- **Klarigo de vortoj kaj esprimoj**

Tiu ĉi tasko helpas pli bone koncepti la vortojn, specialajn esprimojn kaj klare vortumi ideojn. Provu mem!

> Kio estas *malferma tago, elturniĝema, distrita, denaska instruisto, ambiciulaĉo, studplano* aŭ *eviti lernejon?*

Tion povas enkonduki la inversa tasko, kiu disponigas la difinojn kaj petas solvon:

> Mallaŭte diri la respondon al samklasano, kiam tiu estas pridemandata: *flustri*
> Kontrolisto de lernejoj: *lerneja inspektoro*
> Lernanto, kiun la instruisto pli ŝatas ol la aliajn: *favorato de la instruisto*

- **Listigo** (de elementoj kiel respondo al la demando):

> Kion enmetas lernanto en sian sakon/poŝon?
> Kion faras pordisto, purigisto, lerneja direktoro, inspektoro, matematikisto?

- **Truteksto** (enmeto de mankantaj vortoj)

> Petro pretigas sian matematikan taskon. Li uzas sian …… kajeron. Sed li ne povas daŭrigi la laboron, ĉar lia plumo ……. Li serĉas krajonon kaj daŭrigas, sed li faris eraron, li devas …… la neĝustan nombron. Li …… la eraron kaj kalkulas plu. Denove li …… ion kaj la sekva rezulto same estas erara.

- **Tekstokreo**

Povas ekesti tute interesaj historioj, se ni petas la gestudentojn elpensi historion uzante kiel eble plej multe da vortoj de iu tereno ekspluatante la temvortaron. Laboro en paroj estas pli efika kaj spronas la interparolon en la cellingvo inter la partoprenantoj.

- **Rolludoj** (por 2-3 lernantoj)

La sekvaj rolludoj aktivigas la vortoprovizon de lernado kaj la parolkapablon de la lernantoj:

> 1. Infano volas iri ludi kun la geamikoj, patrino provas reteni lin/ŝin por lerni, ja proksimiĝas la jarfino.

2. Konsilado pri profesielekto kaj studeblecoj.
3. Fil(in)o ne volas studi (preferas esti memstara), patr(in)o provas konvinki lin/ŝin por studi (estontaj eblecoj).
4. Intervjuo kun gajninto de konkurso pri fiziko / historio!
5. Intervjuo kun la ministro pri edukado (studkotizoj, stipendioj, kreditoj, studenthejmoj, eblecoj por freŝdiplomitoj, plibonigo de lerneja infrastrukturo, altigo de instruista salajro).

- **Dramludoj**

Ĉi tie la tuta grupo havas iun rolon (se ne, tiam ili estos prijuĝantoj aŭ raportantaj ĵurnalistoj). Plej bone, se la elekto de roloj okazas fare de la partoprenantoj. La ludo disvolviĝas laŭ ilia improvizita kontribuo.

Ekzemplaj scenaroj:

1. Du lernantoj interbatis en la mezlernejo pro iu problemo (mono, knabino, …), la brako de unu estas preskaŭ rompita. La direktoro aŭskultas ilin kaj kelkajn samklasanojn, kiuj vidis la scenon, poste li venigas la klasestron kaj la gepatrojn.
2. Firmao anoncis laboron, kaj nun alvenas la kandidatoj por interparolo (atentu unuflanke la kapablojn, spertojn kaj la taŭgecon de la kandidato, aliflanke la laborkondiĉojn, avanc-eblojn kaj salajron).

- **Diskuto**

Se la partoprenantoj jam bone regas la vortoprovizon de la temo, eblas libere diskuti pri rilataj temoj, kiel:

1. Ĉu instrui laŭ la nivelo de averaĝaj lernantoj aŭ disigi lernantojn laŭ kapabloj?
2. Efika lingvoinstruado.

- **Skribaj hejmtaskoj**

Ankaŭ la hejmtaskoj helpas fiksi la vortoprovizon kaj la skriban esprimka-pablon, en mallongaj priskriboj la gelernantoj povas sin ekzerci pri tio, ekz.: Alvoko por kurso, somera tendaro;
Varbilo por lernejo;
Raporton pri lernanto;
Prezenton de iu (iama) instruisto.

Aŭ pli longajn pri:
Lerneja sistemo en iu lando;
Rolo de komputilo en la lernado.

● **Vortfarado**

La afiksoj servas por fari novajn vortojn. Iu tema kadro povas helpi ankaŭ la ripeton de kelkaj afiksoj. Ĉe **lernado** estas bone ripeti **mis-,** serĉante vortojn kiel *mislegi, misprononci, misskribi, miskompreni, misorientiĝi, mistaksi, misplani*, **preter-** kiel pretervidi, *preteratenti (eraron), preterdormi (kaj ne alveni ĝustatempe en la lernejon*) aŭ **el-** kiel *ellabori, elpensi, eltrovi, elfali, elĉerpiĝi.*

Same bone eblas konsciigi la partoprenantojn pri la problemo de -ig/-iĝ per konvenaj ekzemploj:

anonci ion ie – anonciĝi ie,
ekzameni iun pri io – ekzameniĝi pri io,
ekzerci iun pri io – ekzerciĝi pri io,
komenci ion – komenciĝi, fini ion – finiĝi,
interesi iun – interesiĝi pri io, elĉerpi ion – elĉerpiĝi

La gelernantoj skribas, legas ion kaj komprenas certajn aferojn, do ili evoluas kaj la instruisto skribigas, legigas ilin kaj komprenigas certajn aferojn al ili, do li evoluigas ilin.

4. Vortoprovizo kaj kulturo

La vortoprovizo estas ankaŭ spegulo de kulturo, ĉiuj elementoj de kulturo estas vortigitaj. La naciaj lingvoj estas kulture ŝarĝitaj, el ili eblas multe ekscii pri la aktuala kulturo. En Esperantio mankas la plena gamo de socia vivo kaj instituciaro, pro tio e-o ne havas specialajn vortojn ekz. por la instrusistemo – ne havas diversajn proprajn lernejtipojn, sed pro la flekseblecо de la lingvo eblas esprimi la naciajn sistemojn.

Tamen la establiĝintaj terminoj en la etnaj lingvoj tradukitaj en e-o ne estas precize kompreneblaj por alilingvanoj, eĉ se temas pri la plej ĉiutagaj vortoj kiel *mezlernejo, truhoro aŭ libera leciono, gepatra konferenco, malferma tago, eviti lernejon, ĉionsciulo, helpklaso, kontrollibreto* ktp. La vorto profesoro ofte estas malsame uzata fare de esperantistoj: ĝi estas la plej alta universitata grado, sed kelkaj uzas ĝin ankaŭ por mezlernejaj instruistoj. La ordigo de nocioj en la temvortaro ankaŭ ĉi tie helpas certagrade.

5. Resume

Esperantistoj ofte kontentiĝas per la baza nivelo, post la komenca kurso ili ĉesigas la organizitan lernadon, pro tio ankaŭ lernolibroj por la progresa nivelo malpli multas. Dank’ al la flekseblecо de la lingvo eblas

elturniĝi eĉ per minimuma vortoprovizo. Tion celas ankaŭ la rapidkursoj, pri kiuj oni fanfaronas, ke post unu semajno la partoprenantoj povas ekzameniĝi.

Tamen la profunda scio de E-o postulas pliriĉigon de la vorto-provizo kaj ankaŭ laboron pri ĝi, ja eĉ kelkaj bazaj terminoj ne estas stabiliĝintaj. La traktitaj taskoj donas ideojn por la varia instruado kaj turnas la atenton al problemaj vortoj, esprimoj. Pluajn taskojn vi trovos en la ĝis nun aperintaj tri volumoj de la laŭtemaj etvortaroj de la aŭtoro.

Malrapida tradukanto

de Graziano RICAGNO (IT)

Prezentado de la esploro.



Kial dekkvinjaraĝa knabo, lerte kaj rapide laboranta, neatendeble iufoje atingis gravajn mal-sukcesojn en enklasaj taskoj, speciale dum tradukado, ĉar li foje malmulte laboris kaj foje fantazie tradukis? Instruistoj prezentis la problemon kaj petis solvon. La knabo estis tute sana kaj inteligenta, parolis logike kaj racie, sed dum la renkontiĝoj (unu horo) ne kapablis traduki simplan tekston (Ekz. la unua teksto de la zagreba metodo: Karlo estas mia kara amiko ....). Dum grupo-renkontiĝo, kiam pli longa tempo estis disponebla (preskaŭ du horoj), li sukcesis sed bezonis multe pli da tempo ol samklasanoj. La unua hipotezo estis, ke li eble konfuziĝas pro samtempa plurpensado: eltrovi sufiksojn, traduki vortojn kaj kompreni la sencon de la frazoj. Do mi klopodis helpi lin ne petante tradukon de teksto sed nur de vorto-listoj. Tial iufoje li tuj intuiciis la signifon (ankaŭ se la esperanta vorto malmulte similis al iu itala), iufoje li aspektis mallerta pro mistraduko aŭ netraduko de ŝajne simplaj vortoj. Ĉu oni povis pripensi specifan traduko-malfacilaĵon? Eble; sed antaŭ ol hipotezi specialan ‘malsanon’ ni serĉu pli simplan kaŭzon!

Post malmulte da tempo alvenis iuj aliaj knaboj havantaj la saman problemon. Mi laborigis ilin individue kaj priatentis ilian labormanieron. Do finfine la kerno de la afero estis malkovrata! Ili bezonis longegan tradukan tempon kiam ili uzis la vortaron. Mi malkovris, ke ili, serĉante vortojn en la vortaro, turnas la paĝojn de la unuaj, ĝis ili trovis la saman komencliteron de la serĉata vorto. Por eltrovi la duan kaj trian literon, ili ree turnas la paĝojn en sama maniero. Ekzemple: se ili serĉis la vorton 'vivo', ili turnis ĉiujn paĝojn de la vortaro ĝis ili trovis la komencliteron 'v'; tiam ili revenis al 'va' kaj turnis ĝis ili trovis la 'vi'; tute same por la sekvantaj literoj 'v' kaj 'o'. Imagu kiom da tempo por traduki kaj kiom da tento traduki fantazie sen konsulti la vortaron!

La kaŭzo estis la misuzado aŭ la malkono de la alfabeta ordo. Kiu povas suspekti tian problemon ĉe gimnaziaj lernantoj?! La alfabeton oni instruas dum la elementa lernejo! Do de tiu momento mi decidis enmeti ankaŭ alfabetan taskon por testi la laborkapablon de infanoj/knaboj.

Homoj kaj materialo.

La esploro okazis ĉe 212 'pacientoj', korpe kaj mense sanaj, kies nura problemo estis mislernado. Por komparo estis testataj 82 knaboj sen problemoj. Ĉiuj provoj estis 403 por kontrolo (averaĝe: po 4,9 provoj por knabo) kaj 503 ĉe pacientoj (averaĝe: po 2,4 provoj). La malpli granda nombro de provoj ĉe 'pacientoj' dependas de tio, ke ili eraris kaj ne ŝajnis psikologie ĝusta metodo laborigi ilin por instigo al pliaj malsukcesoj. La aĝo estis de naŭ ĝis dek ok jaroj. La provoj de la unua ĝis la lasta pli malfaciliĝas. Por faciligi la unuan kontakton kun tia laboro aŭ maltimigi iujn timemajn knabojn, iuj slipoj (la unua kaj la tria) enhavis nur italajn vortojn.

La tasko estas: ordigu la jenajn vortojn laŭ alfabeta ordo:

Unua slipo (Facila. La inicialoj estas la dudek unu literoj de la itala alfabeto: a, b, c, d, e, f, g, h, i, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, z): correre, fiore, imparare, mela, bambina, elefante, hanno, naso, pagina, riga, acqua, dopo, luce, occhio, scuola, uomo, gioco, qualcuno, tavolo, zucca, volante

Dua slipo (malpli facila; ĝi enhavis simplajn vortojn sed ne ĉiujn inicialojn. Iuj diris, ke oni ne povas ordigi tiun ĉi liston pro manko de literoj de la

alfabeto c, e, g …): dente, viola, mandarino, bis, testo, libro, fumo, rapidi, lago, punto, nove, ante

Tria slipo (nefacila; iuj malatentemuloj ne vidas, ke ‘disritmico’ ne havas la ‘t’ kaj ordigas ĝin kiel sĝi estus distritmico): distratto, disturbo, distintivo, distrutto, distogliere, disteso, distante, distonico, disritmico, distributore

Kvara slipo (malfacila): evidente, elefanti, evitante, egoista, elegante, eventuale, evoluto, esplori, enormi, etologia, enigma, estro, estero, esprimo, epidemia, energia, eterna, eminente, elemento, emanato

Kvina slipo (malfacila; la plej ofta eraro estas la misloko de karnavalo, taksata kvazaŭ ĝi estus ‘kanavalo’):

kabo	karnavalo	kajero	karavano
kabareto	kanino	kakao	karaktero
kabano	kanelo	kalo	karborundo
kablo	kanalo	kalko	karbo
kabrioleto	kanto	karoto	kartono
kaduka	kantino	kakto	kalandro
kadro	kantileno	kaldrono	kalendaro
kardinalo	kapo	kalifo	kalkano
kafo	kapitano	kamarado	kanoto
kajuto	kapitalo	kandelo	kano

Sesa slipo (komplika): Tiu ĉi slipo havas du farendaĵojn (por kontroli ĉu la respondoj estas ĝustaj ankaŭ en plilaborigaj kondiĉoj): la tasko estas disigi la grupojn havantajn la saman nombron da literoj kaj ordigi la vortojn de ĉiu grupo laŭ alfabeta ordo (ĉi tie oni konsideras nur la ordigon):

UNU SUPER KROM VETURI RESPEKTO VORTARO TRANS SKRIBI PRODUKTI KVANKAM LASTA KUTIMO INTER HALTI GVIDI EKSTER DUBI ALMENAŬ FOJO TAMEN ENTUTE TUJ OFTE FAKO SEKVANTA APARTA BRUO PRAVI DESTINI PUNKTO POR KUKO DUDEK KRIO DEKSTRE TASKO ESTRO ASPEKTI KELKA DUDEKTRI TRIDEKUNU TROA.

3 literoj: POR, TUJ, UNU
4 literoj: BRUO, DUBI, FAKO, FOJO, KRIO, KROM, KUKO, OFTE, TROA
5 literoj: ktp.

.....
8 literoj: DUDEKTRI, PRODUKTI, RESPEKTO, SEKVANTA.
9 literoj: TRIDEKUNU.

Rezultoj

La sekva tabelo enhavas la rezultojn de la esploro: la datumoj de la dua kaj de la tria slipoj aŭ de la kvina kaj de la sesa slipoj estas tute similaj, kaj por simpligo kunmetitaj; ‘aĝo’ signifas la averaĝan aĝon de la grupo; ‘ekzakte’ rilatas ekzaktan faron de la tasko; ‘bone’ indikas malgravan eraron: ekz: forgeso de unu vorto, interŝanĝo de du proksimaj vortoj (elegante antaŭ elefanti, mislegado de ‘disritmico’ kiel distritmico); ‘mal-bone’ rilatas al grava miskompreno aŭ misfarado de la tasko.

Kurioze, tri knaboj sendepende ordigis la literojn de ĉiu vorto: ekz: kabo = abko; kabareto = aabekort ktp.

Slipoj	Pacientoj	ekzakte	aĝo	bone	aĝo	erare	aĝo
1ª	45	63%	11,18	34%	11,63	2%	14,0
2ª, 3ª	226	42%	13,55	37%	13,35	20%	12,7
4ª	78	47%	13,43	30%	13,29	21%	12,6
5ª,6ª	154	33%	14,73	50%	14,0	15%	13,3
ENTUTE	**503**						
	kontrolo	ekzakte		bone		erare	
1ª	105	57%	12,96	37%	11,94	5%	12,0
2ª, 3ª	174	55%	13,10	28%	12,72	15%	12,8
4ª	93	71%	13,31	27%	12,24	2%	11,0
5ª,6ª	31	54%	13,88	29%	13,44	16%	12,8
ENTUTE	**403**						

Oni vidas, ke la procentaĵo de ekzaktaj respondoj estas plia ĉe kontroluloj ol ĉe ‘pacientoj’ kaj la aĝo de la kontroluloj estas malpli alta, sed la diferencoj aspektas sufiĉe malgrandaj.

Eble oni povus eltrovi statistikajn malsimilecojn inter la datumoj de la grupoj, sed ankaŭ sen statistiko eblas konkludi: misuzado de la alfabeta ordo troveblis ĉe duono de la lernantoj (iom pli ĉe ‘pacientoj’) kaj en ĉiuj grupoj (iom pli ĉe ‘pacientoj’) estis procento de lernantoj, kiuj tute ne uzis la alfabetan ordon.

Laŭ mia sugesto la kontrolo de tia ĉi kapablo utilas, kiam tradukaj problemoj aperas dum instruado de Esperanto.

Nur Esperanto povas savi la lingvan diversecon,
per taŭga pedagogio

de Georges-Henri CLOPEAU (FR)

La *Eŭropa Unio (EU)* ekkonscias pri la utileco de la komunikado inter la eŭropanoj kaj pri la baroj kiujn la lingva diverseco signifas por la komunikado. Oni ekkonsciis, ke se oni ne ekagos, baldaŭ la lingvo kiun oni plej ofte uzas, iĝos la ununura oficiala lingvo de Eŭropo. Sed la sola reago ĝenerale proponita estas: trudi lernadon de tri eŭropaj lingvoj al ĉiu eŭropano. Tiel, la plej potencaj ŝtatoj de Eŭropo esperas savi sian propran lingvon. Tiu lingva politiko ne ebligos, ke ĉiu eŭropano kapablu komuniki kun ĉiuj aliaj, krom se estas inter la tri altruditaj lingvoj unu komuna por ĉiuj, do tiu politiko ne donas egalan ŝancon por ĉiuj eŭropaj lingvoj. Ĝi nur plifortigas la evoluon al la supereco de la angla lingvo.

Sen rapida reago, baldaŭ la tutaj eŭropaj vivo kaj kulturo vortiĝos en la angla lingvo, kiu post du aŭ tri generacioj superregos ĉiujn lingvojn esprimantajn nun la kulturan riĉecon de Eŭropo.

Kial?

La historio instruas nin, ke ĉiuj nunaj lingvaj areoj koincidas kun areoj kie havis potencon princo aŭ reĝo aŭ – pli moderne – iu nacia registaro. Tiel, la lingvo nomata „natura" estas nur la lingvo ekinstruita de la bebeco. Tiu lingvo tiel multe necesas por la funkciado de la socio. Dependante de la aktuala politika potenco, la gepatroj strebas instrui ĝian lingvon al la infanoj, eĉ anstataŭ la lingvo kiu devenas de la geavoj. Kaj tiel, post kelkaj generacioj, la lingvo de la politika potenco iĝas la gepatra lingvo, en la tuta areo kie tiu potenco regas.

Ne nur la bretonoj kaj la okcitanoj povas konfirmi tion, kaj kompreni la strebojn kiuj necesas por konservi vivanta la memoron de kulturo kies lingvo ne estas tiu de la politika potenco. Tian situacion oni povas observi en multaj regionoj de Eŭropo, kie la politikaj potencoj oftege movis la landlimojn. Sekve en Eŭropo estas multaj minoritataj lingvoj. Eŭropo, nomata „25-lingva", konsideras nur la naciajn lingvojn; fakte estas pli ol 50 lingvoj en Eŭropo!

Do, ĉiam la potitika potenco altrudas sian lingvon. Hodiaŭ estas devigate konsciiĝi, ke tiu politika potenco, fondita de la komerco kaj de la financo, parolas angle. Ĉiuj eŭropaj lingvoj estas nun en sama stato kiel

estis ekzemple la bretona antaŭ cent jaroj. Ĉiuj gepatroj nun volas, ke la infanoj parolu la anglan. Tute nature ili postulas, ke tiu lingvo estu instruata fruege, eĉ tre frue, kaj, post kelkaj generacioj, eĉ antaŭ la gepatra.

Multaj eŭropanoj, implikitaj en ekonomiaj aferoj, opinias, ke oni devas „esti realisto", „ne revanto", kaj oni kuraĝe eklernu la anglan lingvon; ĉar „la faktoj estas tiaj" ne ŝanĝeblaj. Sukcesos en la vivo nur tiuj, kiuj perfekte regas tiun lingvon.

Feliĉe, ne ĉiuj tiel facile akceptas la finan forpason de la aliaj lingvoj. Kaj oni sin alkroĉas al la ideo: devige instrui du aŭ tri naciajn lingvojn al ĉiuj eŭropaj infanoj. Rimarku unue, ke en la 25-lingva Eŭropo, por certigi komunikeblon inter du ajnaj eŭropanoj, necesus, ke ĉiuj regu 13 lingvojn; tio estas multe pli ol kvar! Do por certigi komunikeblon inter du ajnaj eŭropanoj, nepre necesas havi unu komunan lingvon. Do, la multlingvismo ne certigos egalecon inter ĉiuj, kaj ne malebligos la „naturan" devigon al ununura lingvo, al tiu de la potenco.

Aliparte, oni estu realistaj. Lerni unu fremdan lingvon postulas multe da tempo, kaj, por pli ol duono de la homaro, lerni pli ol du malebligas ĉiun aliron al scienca kulturo. (Jam nun oni povas taksi la laŭstatistikan antaŭiĝon en scienca esploro de la denaskaj angloparolantoj, kiuj ne bezonas lerni fremdan lingvon). Tiel, la starigo de plurlingvismo kreos hierarkion, kiu brilos en neniu tereno.

Nu, kion proponi?

Iuflanke, ĝeneraligado de la instruado de la angla lingvo estas nun ne evitebla, ĉar la nuna potenco estas anglalingva. Aliflanke, tiu supereco, kiu kuntrenas perdon de vivoforto por ĉiuj lingvoj kaj malfekundan unuformigon de la kulturo, estas tute ne akceptebla. La problemo ŝajnas esti nesolvebla. Feliĉe, la metodo kiu estas la plej efika, plej rapida kaj la plej ŝparema por lerni fremdajn lingvojn (kaj precipe la anglan), estas lerni antaŭe E-on. Se oni akceptus uzi tiun metodon, plej multe da eŭropanoj alirus al la lingvo de la potenco, kaj la deziro de ĉiuj gepatroj (deziro trudita de la faktoj) estus realigita. Sed plue, ĉiuj infanoj pli bone analizus sian patrinan lingvon, kaj ili lernus pli bone kaj pli rapide la lingvojn kiujn ili elektus laŭ sia intereso.

Pli poste, kiam ĉiuj eŭropanoj scios E-on, nur tiuj kiuj interesiĝas pri la angla kulturo, elektos lerni la lingvon de Shakespeare (kiun jam kelkaj angloj ne plu komprenas). Starigo de propra eŭropa potenco eblos,

kvankam ĉiuj lingvoj, eĉ minoritataj, povos vivi sen esti poluitaj, kaj radii t.e. interesi homojn parolantajn aliajn lingvojn.

Sendube, dezireblas, ke eŭropaj lernantoj devige lernu almenaŭ du lingvojn krom E-o kaj la patrina. La unua estus tiu de la pli proksima najbaro (kiu, en kelkaj kazoj, ne estas en alia nacio – ekzemple la francparolantoj kiuj loĝas en la okcidenta Bretonio lernus la bretonan, kaj tiuj kiuj loĝas en la orienta lernus la gallan) cele krei ĉe ĉiu landlimo specon de kunligo. La dua estus elektita tute libere de nura kultura interesiĝo aŭ sciemo; tiu eĉ eble estus regiona lingvo de tre malproksima lando. Evidente, ne estus malpermesite lerni pli multe da lingvoj (emo kiun ofte donas la antaŭa lernado de E-o). Sed tiuj studoj ne estus truditaj al ĉiuj lernprogramoj, ĉar ekde kiam realiĝos la eblo komuniki kun ĉiuj, estos akcepteble, ke kelkaj studentoj ŝatos utiligi pli da tempo por matematiko aŭ sciencoj aŭ aliaj fakoj.

La eblo por ĉiu komuniki kun ĉiuj, farante unu al la alia la saman paŝon, laŭ perfekta egaleco, estas nepre necesa kondiĉo por demokrata vivo (precipe por „partoprena" demokratio). La angla lingvo estas tro malfacile skribata (fantazia ortografio), tro riĉa je „anglismoj", tro nepreciza por ke ĉiu povu mastri ĝin, malgraŭ la grandegaj financaj kostoj kiujn la eŭropaj ŝtatoj ŝajnas akcepti. Tiu lingvo kreas hierarkion kie angloparolantoj ricevas la plej influajn postenojn, kiujn multaj eŭropanoj ne povos atingi.

Esperanto en lernejo

La sekvaj faktoj multfoje estis pruvitaj: Ĉiu instruisto de lernejo kiu instruas sian gepatran lingvon kapablas, post kelkaj horoj de E-studado, komenci enkonduki siajn lernantojn en E-on. Fakte, sciante la neŝanĝiĝantan sonon de ĉiu litero kaj la neŝanĝiĝantan lokon de la akcento, reflekse legante tiujn literojn, aliparte sciante la 16 gramatikajn regulojn kiuj enhavas neniun escepton, li povos instrui nenion falsan. Li komencos instrui per kelkaj radikoj kaj afiksoj, kaj instruante ankaŭ li mem progresos: Li lernos novajn radikojn kaj precipe li progresos por lerte konstrui vortojn kaj frazojn. Post unu lernojaro, li kapablos legi kaj skribi kun helpeto de vortaro. Liaj gelernantoj same kapablos, sed malpli lerte, malpli rapide, kaj kun pli ofta uzo de la vortaro. Internacia korespondado estos organizata kaj, fine de la tria lernojaro, lernantoj kaj instruisto kapablos kune partopreni internacian kunvenon kun samaĝuloj.

Por esti efika, la instruado de E-o en elementa lernejo (tri jarojn inter la 8-a kaj la 12-a) estu nepre ligita al instruado de la patrina lingvo po

10 aŭ 15 minutojn tage (kaj ne per longaj kursoj disigitaj de longaj interrompoj). La gepatra lingvo, analizo kaj gramatiko, profitegos el tiu instruado, kaj ĉiu fako profitos el la precizeco kaj logikeco de E-o.

Neniu alia metodo ebligas atingi la (dume) deziratan celon por la angla lingvo, tiel certe, tiel rapide, kaj tiel ŝpareme. Rifuzi ĝin klare signifas akcepti, ke la disvastiĝo de la angla ne estas provizora, kaj deziri kompletan kaj definitivan submetiĝon sub la angloparolanta potenco.

Kiel mi perdis 5 jarojn el mia esperantista vivo?

de D-ro *Lajos MOLNÁR*, prez. de Budapeŝta Medicina E-Fakgrupo



En la lernojaro 1959/60 mi vizitis sud-hungarian, provincan, medicinan universitaton. Somere de 1960, en julio mi devis partopreni „socian laboron" en iu vilaĝa agrikultura kooperativo, kaj fine de la unua monato de la someraj ferioj mi estis korpe-anime sufiĉe laca. Mi serĉis „spiritan nutraĵon", kiam mi – promenante sur la Malgranda Bulvardo de Budapeŝto – rimarkis en la montrofenestro de Librovendejo de la Pedagogoj maldikan Lernolibron de Esperanto, kies aŭtoro estis *Julio BAGHY* [*vd sube*].

Ĝis tiam mi sciis pri Esperanto nur la kutiman frazon, ke – „Ĝi estas ia artefarita lingvo." La libreto estis tre malmultekosta, do mi riskis 14,- forintojn kaj aĉetis ĝin. (Mia monata stipendio estis tiutempe 700 HUF). Veturante hejmen, jam en la trajno mi scivole tralegis la Antaŭparolon kaj la Gramatikan enkondukon. Tie min kaptis la melodio de Esperanto, kiam mi legis strofon el la fama poemo *Fine de septembro* de Sándor Petőfi, nia poeto-liberecbatalanto:



Jen floras ankoraŭ la floroj en valo,
Jen verdas ankoraŭ la poploj ĉe l' font',
Sed vidu, jam tie la vintra vualo,
La neĝo ekkovris la supron de l' mont'.

La unuan tagon mi ellernis la Enkondukan lecionon, la alfabeton kaj la fonemojn, la vokalojn kaj la konsonantojn, ilian prononcon, la akcenton kaj la bazajn regulojn de la ortografio.

La duan tagon mi pasigis per lernado de la unua leciono, la trian tagon per alproprigo de la dua leciono, kaj ĉiutage – dum 6-8 horoj – mi ellernis unu lecionon…

Ĝis la fino de aŭgusto mi trastudis la tutan lernolibron, kaj mi estus povinta paroli E-on mezgradnivele, se mi havintus esperantistan partneron. Neniu alia lingvo donis al mi tiel grandan sukcestravivaĵon, kian la lernado de E-o rezultigis. Bonhumore kaj feliĉe mi komencis la duan studjaron. Fiere mi rakontis al nia universitata, gvidanta lektoro pri fremdlingvoj mian someran, lingvistikan Esperanto-aventuron.

Kiel malvarmega duŝo tuŝis min la opinio de la ŝatata kaj respektata sinjoro lektoro: „Ludoviko, komprenu bone, ke E-o tute ne estas lingvo. Ĝi estas stultaĵo. Serioza homo ne okupiĝas pri E-o. Lernu anstataŭ E-o normalan lingvon, ekzemple la italan!…”

Tiel okazis, ke en la sekvantaj kvin jaroj mi tute ne okupiĝis plu pri la internacia lingvo Esperanto.

Do en la dua studjaro de la universitato – laŭ la propono de la sinjoro lektoro – mi komencis lerni la italan lingvon.

Dum la unua studhoro mi surprizite konstatis, ke ĝuste la sinjoro lektoro instruas la italan lingvon. Tiu ĉi lingvo ŝajnis al mi tre facila: „*La lingua italiana è molto facile per me*.” Nek la sinjoro lektoro, nek miaj samgrupanoj volis kredi, ke antaŭe mi neniam lernis la italan lingvon. Ili pensis kaj diris, ke mi mensogas asertante, ke vere, mi neniam lernis ĝin. Nur nun, post jardekoj de senĉesa uzado de E-o mi malkovris, ke tiutempe mi spertis la kapabloevoluigan, **„propedeŭtikan” efikon de E-o**, la fakton, ke helpe de E-o oni povas facile alproprigi la metodikon de la lingvo-lernado.

Dum la sekvintaj 5 jaroj la maldika lernolibro de Julio Baghy kuŝis ie sur mia librobreto. Mi provis uzi la germanan, anglan kaj rusan lingvojn dum miaj universitataj studoj, - sed mi ĉiam sentis la malkomfortan fakton, ke parolante kun denaska germano, anglo kaj ruso mi estas kaj eterne restos **„duaranga lingvouzanto”, kiu neniam diras tion, kion li volas, sed nur tion, kion li povas.**

Post mia duonjara soldata servo, en 1966 mi komencis mian kuracistan praktikon en la budapeŝta Hospitalo Ladislao por Infektaj Malsanoj, en la sekcio de ĉefkuracisto ***D-ro Kolomano KALOCSAY***. [*vd. maldekstre*]. Mi estis deĵoranto iun posttagmezon, kiam la ambulancanoj enportis maljunulon en la sekcion. Sur la dokumentoj de la paciento mi ekvidis la nomon ***Julio Baghy.***



De kie mi konas ĉi tiun nomon? Post mallonga cerbumado mi malkovris, ke mi vidas la aŭtoron de la iama, maldika E-lernolibro…

Depost nia unua, persona renkontiĝo mi ofte vizitis la „Paĉjo"-n, Julion Baghy, ĉe lia hospitala lito. La maljuna, malsana, sufokiĝanta homo plibeliĝis, kiam li parolis pri E-o. Li rakontis la historion de sia vivo, la militkaptitecon en Siberio, la vojaĝojn dise en Eŭropo, kiam li ĉie instruis E-on. Li rakontis pri la poeto-amikeco kun Kolomano Kalocsay, pri la revuo Literatura Mondo, pri la universalaj kongresoj de Esperanto. Li donacis al mi la E-lingvan Faraono-n de Bolesław Prus. La tri-voluman romanon mi baldaŭ tralegis kaj grandparte komprenis. Tio estis mia dua, granda sukcestravivaĵo kaŭzita de E-o.

Jen, koncize la historio de mia „aventuro" kun E-o. Mi fariĝis la lasta disĉiplo de Julio Baghy, kiu transdonis al mi sian amon kaj entuziasmon rilate al Esperanto.

En la jaro 1969 ni fondis kaj ekde tiu jaro ni funkciigas la Budapeŝtan Medicinan E-Fakgrupon.

Kaj fine de tiu ĉi historieto permesu al mi la kara Leganto tiri la plej gravan konkludon el mia „aventuro":
Kiel 20-jara junulo mi senvorte kaj senkritike akceptis la opinion de la ŝatata kaj respektata universitata lektoro. Mi supermezure estimis la aŭtoritaton. Dum la pasintaj preskaŭ kvin jardekoj mi ellernis la lecionon: ĉiu homo devas



Baghy kaj Kalocsay, la „Ora Duopo" sur la titolpaĝo de Norda Prismo 1966, N-ro 1

elformi sian pensmanieron kaj opinion. Ĉar estas ĉiam pli facile akcepti aliulan opinion, ol malrapide, malfacile, turmentiĝante krei sian propran starpunkton.

„***Se la devigan disciplinon anstataŭus la memdisciplino, nur tio povus certigi la estonton de la homaro."*** *(D-ro Owe Bruno FAHLKE)*



NdlR – post la redaktofino venis la trista novaĵo, ke nia kara kolego, instruisto kaj verkisto ***Claude PIRON (1931-2008)*** subite kaj kruele forlasis nin. Memore al li, nun sekvu lia mesaĝo (30.12.2007) reage al la supra artikolo de Ludoviko Molnár:

„Kara Ludoviko,

Kun grandega intereso kaj kun-sento mi legis vian mallongan rakonton pri tio, kiel vi malkovris Esperanton. Min kortuŝis, ke vi vidis Julion Baghy, eĉ se la cirkonstancoj ne estis plej belaj. Mi havas al li gigantan dankoŝuldon, ĉar mian esperantistecon liaj libroj edukis. Ili estis la unuaj, kiujn mi legis en nia lingvo.

Mi eterne miros, ke homoj kun aŭtoritato (kiel via kaj miaj instruistoj) tiel facilanime volas sufoki kaj estingi la korflameton de interesiĝo pri Esperanto, sciante nenion pri ĝi, kaj eĉ ne sciante, kial simpla pozitiva scivolemo pri ĝi ilin kolerigas aŭ estigas en ili malestimon. Por kompreni tiun misteron, kiu tre suferigis min dum mi estis knabo, mi studis profundpsikologion. Mi multon komprenis. Sed mi tamen ne vere sukcesis digesti la fakton, ke tiuj homoj kun iom da prestiĝo tiel sen sento pri respondeco mortigas ĝermon de io feliĉiga. Kia fuŝa uzo de sia pozicio! Via rakonto igis min konscii pri la granda bonŝanco, kiu estis mia, kompare kun vi: kiam mi unuafoje parolis pri E-o kun instruisto mi jam plene regis la lingvon. Mi do sciis, ke li malpravas. Sed estis tre malfacile por mi esti sola kun mia praveco kontraŭ la tuta mondo. Tial je la aĝo de 25-jaroj mi fine konsultis psikiatron por scii, ĉu mi estas freneza. Tiel forta estis la premo de la ĉirkaŭuloj, por ke mi ĉesu interesiĝi pri tiu stultaĵo „Esperanto", ke mi dubis pri mi. Mia dua granda bonŝanco estis, ke la homo, kiun mi konsultis, estis saĝa kaj honesta. Li detale ekzamenis

kun mi la aferon, pripensis ĝin ĉiuflanke, kaj konkludis, ke frenezas la tuta socio, dum mia menso tute sanas!

Hodiaŭ en mia regiono troviĝas 40 000 kristanaj gejunuloj, kiuj venis el la tuta Eŭropo por granda ekumena „pilgrimado" organizita de la Taizé-grupo. Ili gastas ĉe lokaj familioj. Estas plorige vidi, kiel ili provas komuniki. Ili kondutas kiel afaziuloj! Estus tiel simple diri al ili: „Tri monatojn antaŭ ol ekvojaĝi al la amaskunveno, komencu dediĉi dek minutojn ĉiutage al la lernado de E-o, vi eble ne povos diri ĉion, kion vi volos, sed vi komunikos dekoble pli bone ol per via fuŝa balbuta angla". La tuta etoso estus alia. Ili vere renkontus unu la alian. Nun estas nur iluzio de kuneco, de kunaparteno, de komunikado. Sed kiam mi diras tion, oni rigardas min, kvazaŭ mi estus frenezulo!
Amike kaj NOVJARBONDEZIRE!
CP"

Internacia supera kurso de E-o en Krakovo

de Piotr NOSEK sekciestro, kaj kurso-partoprenanto (PL)

Ekde aŭtuno 2007, unuafoje oficiala E-kurso en Jagelona Universitato en Krakovo estas disponigita ne nur al la lokaj studentoj, sed ankaŭ al aliurbaj kaj eĉ alilandaj partoprenantoj. La studantoj, kiuj loĝas en Krakovo, partoprenas la ĉiusemajnajn lecionojn en la universitato. Aliurbanoj kaj alilandanoj lernas la samon koresponde, pere de Interreto. Unufoje dum semestro ĉiuj lernantoj havas eblon partopreni tritagan, 20-horan, ĉeestan studsesion. La kurso daŭros ĝis la fino de majo 2008.

Tiu praktika kurso kun bona teoria bazo estas:
– ĝustiga: ĝi celas korekton de eraroj en la lingva kompetento de la partoprenanto,
– plilarĝiga: ĝi celas evoluigon de la leksikaj kaj gramatikaj scioj,
– plibeliga: oni lernas laŭ la principo: „Se vi parolas Esperante, parolu bele".

La materialo kaj metodoj celas rapidan progresadon. La studado de la gramatiko inkluzivas la akuzativon, la artikolon, la participojn, la kunmetitajn tempojn, interjekciojn, sintaksajn strukturojn kaj ĉion necesan por

konstrui bonan lingvan kompetenton. La leksiko estas studata laŭ diversaj signifokampoj, vortserioj, sinonimoj, per originalaj tiukursaj kantoj k.a.

La unua ĉeesta studsesio okazis en la tagoj 21-23 dec. La dudekhora programo de la sesio konsistis el diversaj lingvaj ekzercoj, ekde korektado de elparol-eraroj ĝis ekzercoj pri argumentado kaj prelegado surbaze de paroladoj de L. Zamenhof. La prononc-ekzercoj estis verkitaj de *Maria MAJERCZAK* kaj voĉe registritaj de *Amir HADZIAHMETOVIĆ* (el la muzikgrupo „Esperanto Desperado").

Longa estas la listo de la materialoj kaj diversspecaj edukaj metodoj aplikitaj dum la instruado. Estis uzitaj ne nur konataj metodoj kiel teksto-rakontado, skriba teksto-resumado aŭ voĉa prezentado de tekstoj, sed ankaŭ nekonvenciaj rimedoj, kiel ekzemple komuna gvidata voĉa teksto-produktado – rimedo por rapide lerni novajn, malfacilajn vortojn kaj strukturojn, aŭ lernado de danco, kiu faciligas memorigon de multaj vortoj pri la diversaj aspektoj de homo (temperamenta, spirita, emocia, socia, k.a.). La lecionoj estis variigitaj per aŭskultado de riĉtekstaj kantoj kaj lernado de novaj vortoj per ludado. Partoprenantoj ŝatantaj ĵurnalismon povis satigi sian pasion per redakto-ekzercoj.

Estis trovita solvo, por ke la kursanoj, kiuj ne povas ĉeesti studsesiojn, povu akiri la praktikajn kapablojn, pri kiuj oni sin trejnas dum la studsesioj. La kursgvidantino laboras individue perrete (voĉe) kun la kursano. Ne estas jarlaboraĵo. Ĉiuj taskoj, skribaj kaj parolaj konsistigas la programon de la fina ekzameno. Do, dum ĉiu leciono oni preparas sin al la ekzameno. Tiu povas okazi perrete. Post la fino de la kurso la studantoj ricevos atestilon („Certyfikat") de la mondfama, ĉ. 650-jara universitato, inter kies multegaj elstaraj diplomitoj estis Nikolao Kopernik kaj la posta papo Johano Paŭlo la 2-a.



Kelkaj el la unuaj ricevintoj de la atestilo kun Maria MAJERCZAK

La kurso, konceptita, proponita al aŭtoritatuloj de la universitato, aŭtorata kaj gvidata de Maria Majerczak ŝajnas esti senprecedenca en la historio de tiu bonkvalita supera lernejo.

Diferencigitaj metodoj uzataj dum la ĉeesta kaj ekstera studado, kaj ankaŭ moderna eksplikado de gramatikaĵoj donas al la studentoj unikan okazon levi sian konnivelon de Esperanto. La kurso altiris ne nur e-istojn kun meznivela kono de la lingvo, sed ankaŭ kelkajn konatajn, spertajn samideanojn.

Kvankam la lernado komenciĝis antaŭ kelkaj semajnoj, pro tio, ke ĝi estas koresponda, bonvenaj estas personoj, kiuj volus ankoraŭ aliĝi al la nunaj gestudentoj kaj profiti de la eblo plibonigi kaj ordigi sian lingvo-scion.

Informoj pri la kurso, listo de la partoprenantoj, specimena leciono, aktualaĵoj k.a. troveblas en la retpaĝo: *http://www.esperanto-reto.org*, Studenta Scienca E-Rondo en Jagelona Universitato, aŭ rekte en: *http://docs.google.com/Doc?id=dhp3sf5p_163fp2j3g&pli=1?*

Interkultura dialogo en Hispanio

okaze de la 5-a renkontiĝo en Ejea de los Caballeros (20-27/10/2007)

La kvina internacia renkontiĝo en Hispanio programita de la projekto *Socrates Comenio AKEL 2* (Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj) temis pri: **„Eŭropa civitaneco”.** Tiu ĉi koncepto bezonas, por fariĝi „kulturo” kaj realiĝi pere de konkretaj kondutoj, precizan forĝadon kaj konstantan kontribuon fare de la plej konsciaj plenkreskuloj kaj de la junaj generacioj.

Dum unu semajno, t.e. de la 20-a ĝis la 27-a de oktobro 2007, la itala, bulgara kaj brita delegacioj renkontiĝis en Ejea de los Kabaleros – Hispana komunumo situanta en la aŭtonoma regiono de Aragono kaj ĉefurbo de la Komorska de Cinko Villas - gastoj de la Lernejo „*IES Reyes Catòlicos*”, reprezentita de la instruistinoj *Marta Aries* kaj *Maria Antonia Garayoa.*

La akceptitaj lernejoj, reprezentitaj de gestudentoj kaj geinstruistoj estis, krom la *Ŝtata Mezlernejo Cavour* de Modeno, la *Lernejo Canko*

Cerkovski de Polski Trambesh (Bulgario) kaj la *Sir Thomas Rich's School* de Gloucester (Britio).

La tempo, kiun ni pasigis en la teritorio nomata *Cinco Villas*, aranĝita de la nelacigeblaj instruistinoj Marta kaj Maria Antonia, estis skandita de ekskursoj kaj kulturaj vizitoj al historiaj monumentoj, ĉu civilaj ĉu religiaj, en la provinco Zaragozo.

La veraj ĉefpunktoj de la renkontiĝo, tamen, estis lundo la 22-a en Ejea de los Caballeros kaj ĵaŭdo la 25-a en Zaragozo.

La 22-an de oktobro, fakte, la delegacioj estis oficiale akceptitaj de la Lernejestro en la Lernejo „IES Reyes Catòlicos" kaj en la urbodoma palaco, kie la skabenino pri kulturo kaj la eminenta esperantista verkisto *Antonio Marco Botella* donis grandan prestiĝon al la projekto AKEL kaj al la ideo, kiu ĝin subtenas.

Dum la mateno, post nia partopreno en la gimnastikejo de la lernejo en tre amuzaj kaj movoplenaj tradiciaj popolaj ludoj, okazis la prezentado de la respektivaj konsideroj, pripensadoj kaj proponoj koncernantaj la temon de la renkontiĝo.

La kontribuo de la unuopaj grupoj, farita per PowerPoint-bildoj projekciitaj, evidentigis, ke la ideo pri „Eŭropa civitaneco" estas parte jam konkretigita de Eŭrop-Uniaj disponoj kiuj stimulis en la diversaj landoj la „senton" aparteni al geografia „unuiĝinta" spaco – la himno, la flago, la pasporto, la oficiala festo, la ununura mondevizo Eŭro, la EU-stirlicenco, la malfermo de la landlimoj kaj la abolicio de la kontroloj, la edukaj kaj forĝaj projektoj LLP, la Ĉarto de la fundamentaj Rajtoj de Eŭropa Unio favore al ĝiaj civitanoj, - tamen ĝi devas alfronti ankoraŭ kelkajn decidajn nodojn.

En la klopodoj de la malsamaj delegacioj la konkreta respekto de la homaj rajtoj en Eŭropa Unio kaj la bezono promocii la edukadon, la konsciigon kaj la respekton de la rajtoj de la infanoj kaj de la plenkreskuloj – la rajto je rekono de persona identeco, la rajto je sana medio, la rajto je ekscio kaj je homa kaj kultura kreskado precipe por tiuj kiuj spertas socio-ekonomikajn malfacilaĵojn kaj kulturajn malavantaĝojn – estas la "subtena kerno" de la projekto.

La 25-a de oktobro estis la dua grava etapo – la unua jam okazis en Sofio, aprile 2007 - kaj plua okazaĵo por lingva interŝanĝo kaj homa kontakto kiam ni vizitis la kolegion por surdaj infanoj „La Purisima" de Zaragozo. Fakte inter la italaj gestudentoj ĉeestis surdulino kiu kapablas

esprimi sin ne nur pere de Esperanto kaj de la itala lingvo, sed ankaŭ pere de la itala lingvo de la signoj (LIS). La duan fojon en niaj vojaĝoj tiu ĉi ĉeesto donis la eblon evoluigi la bazan filozofion de nia projekto.

Dum la posttagmezo ni estis invititaj en la sidejon de la Asocio Esperanto „Frateco" de Zaragozo, kie la prezidanto, *Lorenzo Noguero*, kun la grava kaj ĝentila helpo de sinjoro *Sabino Pelegrin Colombo* kaj de la aliaj samideanoj, organizis bufedon kaj la verkisto *Antonio Marco Botella* donacis al ĉiuj gastoj la libron „Lirikaj perloj de Al-Andalus", valoregan kolekton de poemoj esperantigitaj de li.

La eŭropa projekto Socrates Comenius por interkultura dialogo kaj alternativa komunikado inter Italio, Bulgario, Britio kaj Hispanio fermis, per tiu ĉi vizito, la 5-an etapon de profitodona itinero de kreskado.

Ni ĉiuj revidos nin dum aprilo 2008 denove en Bulgario. Tie atendas nin la konkluda fazo de la trijara projekto: ne nur finaj konsideroj kaj la bilanco de la sperto, sed ankaŭ la komuna ellaborado de malgranda vortareto kun interparolaj frazoj en E-o kaj multmedia populariga materialo plurlingva – koncernanta, ĝuste, la lingvojn de la kvar landoj – destinata por rekonfirmi la intencon daŭrigi la serĉadon de konkreta realigo de la ideo de respekto kaj kono de la lingva kaj kultura havaĵo de la popoloj kaj ankaŭ de la neceso rekonfirmi la validecon de la pontolingvo E-o.

E. TARRACCHINI, V. BOCCHINI, L. OBERRAUCH kaj V. MADELLA (profesoroj)
E. GANZERLI, S. SERRA, F. GRANO, D. AIELLO kaj A. CIONI (gelernantoj)



La delegacioj de la projekto AKEL antaŭ la Palaco Aljaferia en Zaragozo

Burundo

Post la starigo de Klubo en Cibitoke (Orienta provinco), en Universitato, en Gitega kaj en aliaj lernejaj lokoj, nia strategio pri starigado de kluboj en lernejoj daŭras. La frukto estas pli bona, ĉar post unu jaro, la klubanoj mem zorgas pri la afero kaj tio malpliigas la elspezojn. Mi ekinstruis ĉe ETS-Kamenge, la plej granda teknika lernejo en Burundi (kun ĉ. 2000 lernantoj).

Ĉ. 45 studentoj ĉeestis la kurson kaj ili promesis al mi, ke en la venonta jaro ili instruos al aliaj.


Nun ni bezonas librojn por komencantoj kaj por progresantoj, ĉar nia stoko ekmalpleniĝas. Ĉu iu povas helpi nin?

Jérémie SABIYUMVA, ANEB (Asocio Nacia por E-o en Burundo) BP:170 Rumonge, Burundi. Tel. (+257)77733052, <jerrybs21@yahoo. fr>

Francio

Esperanto – nenies unua, ĉies dua lingvo

Pensante pri infanoj en la bazaj lernejoj dum Lingvotago, kaj precipe pri la instruistoj, kiuj intencas fari ion por E-o, mi preparis afiŝon (vd sube) kun nur konturoj (eble oni volos uzi ĝin por kolorigi) kaj metis ĝin en mian retejon sur la paĝo: *http://users.telenet.be/griza_leono/Eo_EO_konturoj.gif*.



La kolora afiŝo troviĝas ĉe: *http://tinyurl.com/3xnzl5*.

La afiŝoj estas libere kopieblaj „por la bona celo de E-o”.

Se iu deziras similan afiŝon en alia lingvo, ŝi/li tuj kontaktu min.

Pri la ekzistantaj nacilingvaj versioj legu ĉe: *http://users.telenet.be/griza_leono/Afiŝoj_pri_Eo.htm*.

Leo DE COOMAN

Konkurso de infandesegnaĵoj

Ni invitas la instruistojn sendi desegnaĵojn al: *Esperanto en Vendomois, Les Monts, FR-41330 Lunay, <esperantoenvendomois@free.fr>*.
Jara temo de la konkurso: Vojaĝi…… *Formato*: min. 40 cm-oj x 30 cm-oj.
Kategorioj: A: ĝis-7-jara; B: pli-ol-7-ĝis-10-jara; C: pli-ol-10-ĝis-14-jara.
Limdato: 25 majo 2008.
Dorse de la desegnaĵo notu, E-lingve, nomon, aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ de la E-klubo, kaj koncizan priskribon de la verko. Premioj estos atribuataj po 3 en ĉiu kategorio. Ĉiu infano ricevos diplomon.

Germanio

Jen mallonga raporto do pri la jarfina, elementnivela UEA/ILEI-ekzameno organizita de Interkultura Centro Herzberg en Würzburg, Germanio, dum la Internacia Seminario (IS), 30-31 decembro 2007:

La lokaj organizantoj zorgis pri bonaj, trankvilaj kondiĉoj, la interesiĝo pri la ekzameno estis kontentige bona, kelkaj junuloj bedaŭris, ke ili ne povas partopreni pro aliaj organizaj taskoj aŭ paralele okazantaj gravaj programeroj; ekzamenis *Zsófia KÓRÓDY* kaj *László SZILVÁSI* el Hungario, *Peter ZILVAR* el Germanio, partoprenis 5 kandidatoj el 5 landoj, kaj jen la rezultoj: *Valere DUMONT* (Belgio) kontentiga, *Nicholas KALIVODA* (Usono) tre bona, *Elisabeth LAIKA* (Germanio) tre bona, *Tim OWEN* (Britio) bona, *Cesco REALE* (Svislando) tre bona. Gratulojn al la junaj, talentaj e-istoj!

Multaj junuloj pro financaj kialoj ne povas partopreni en UK kaj trapasi internacian ekzamenon tie. Pro tio estis grave doni ŝancon al bone parolantaj junaj esperantistoj ekzameniĝi en loko de ili vizitata. Estis grava tiu ekzameno ankaŭ el la vidpunkto de komparado: kiel la nunaj UEA/ILEI-ekzamenoj akordiĝas al la postuloj de la ĵus tradukita Komuna Eŭropa Referenckadro, kiu difinas la nivelojn de A1 ĝis C2?

Interkultura Centro Herzberg planas organizi ekzamenojn ankaŭ en 2008. Interesiĝantoj, testpersonoj por memtestado kontaktu: *Zsófia Kóródy, DE-37412 Herzberg, Grubenhagenstr. 6, zsofia.korody@esperanto.de*

Laŭ la planoj UEA/ILEI-ekzamenoj en 2008 okazos dum UK (19-26, Roterdamo, Nederlando) kaj dum la ILEI-konferenco (29.07-05.08.2008, Porto-Novo, Benino).

Hungario

La Hungara Asocio de Esperantistaj Instruistoj (EPME) aperigis 80-paĝan libreton kun la titolo „Portretaro de Hungaraj Esperanto-Instruantoj”. En la eldonaĵo estas trovebla la aktuala, 55-persona membrolisto de la asocio (inter ili la 41 membroj de ILEI-HU) kaj 45 aliaj E-instruantoj, do, sume la nomo kaj loĝloko de 100 E-instruantoj. La enketilon de EPME/ILEI-HU resendis entute 80 gekolegoj. En la (ĉefe hungarlingva) eldonaĵo ni aperigis la tiel kolektitan respondaron, kune kun la ricevitaj portretoj de niaj kolegoj.

En la datumbazo oni povas trovi ekz. la sekvajn indikojn: naskiĝdato, loĝadreso, telefono, retadreso, hejmpaĝo, profesio(j), parolataj lingvoj, E-lingvoekzamenoj, membreco en E-organizaĵoj, E-movada agado, E-instrua agado, proponoj por evoluigi la E-instruadon.

La resendintoj de la enketilo reprezentas ĉiujn 19 departementojn de Hungario, krome ni havas 23 resendintojn el Budapeŝto.

La libron kompilis *Jozefo NÉMETH*, sekciestro. Sur la kolora kovrilpaĝo videblas la portretoj de 64 gekolegoj (ĝin pretigis *Jozefo BAKSA*).

La eldonon de la libreto finance subtenis NCA (*Nemzeti Civil Alapprogram* – Nacia Civila Bazprogramo).
La libro ne estas aĉetebla en librovendejoj, sed ĝin aŭtomate ricevis/os ĉiuj nunaj kaj estontaj membroj de EPME/ILEI-HU (plus tiuj 45 gekolegoj, kiuj resendis la enketilon).

Jozefo NÉMETH, sekciestro

Kubo

16 -18 novembro 2007 okazis en Havano, la unua kolokvo de KEA sub la temo „*Esperanto: lingvo, kulturo, movado*”. La kolokvo arigis pli ol 70 esperantistojn el la tuta lando en la sidejo de la Malgranda Baziliko de la Monaĥejo Sankta Francisko de Asizo.

La programo inkluzivis prelegojn pri la historio de la kuba E-movado, pri nuntempo kaj estonteco de la movado internacia, kulturaj kaj instruaj temoj kiel prezento de programaro kreita de kuba esperantisto por interaktiva kurso en komputilejaj kluboj, kaj aliaj.

Por la unua fojo la kuba ILEI-sekcio okazigis ekzamenan sesion de KEA, kies rezulto estis tre pozitiva. La kubaj ekzamenoj estas kreitaj surbaze de la principoj starigitaj de la internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA

kaj celas daŭre plialtigi la lingvajn kapablojn de la kuba esperantistaro por alfronti estonte gravajn eventojn internaciajn kiel la Unua Kultura Festivalo de KEA planata por novembro de la jaro 2008 kaj eventuala okazigo de UK en Kubo en la jaro 2010.

La kolokvon kompletigis Forumo kaj kulturaj programeroj.

laŭ informoj de Maritza GUTIÉRREZ

Svislando

La ĝeneva grupo *La Stelo* – kun subteno de Svisa E-Societo – lanĉis konkurson por 100 homoj kiuj pretas lerni E-on dum la venontaj monatoj (*http://www.concours-esperanto.ch*).

La anonco esence diris: kun la celo pruvi, ke E-o estas facile lernebla lingvo oni serĉas junulojn, kiuj ĝis la 15-a de marto 2008 per iu ajn rimedo provos lerni la lingvon: libroj, kursoj, interreto, privatinstruisto ktp. La premioj varias inter 500 kaj 3000 svisaj frankoj. Por partopreni la konkurson oni devos sendi originalan 200-vortan tekston en E-o plej malfrue la 15-an de marto 2008 kaj partopreni ekzamenon je fino de marto 2008.

Jam malmultajn tagojn post la lanĉo de la konkurso oni atingis la 100 aliĝojn! Do oni havas jam la 100 kandidatojn kiuj nun studas la lingvon por partopreni en la premiado. Kaj ankoraŭ daŭre venas pliaj interesuloj! Do oni jam nun povas paroli pri la plej sukcesa kampanjo okazinta por E-o en Svislando de post la tempo kiam Lidia Zamenhof en la 20-aj jaroj faris sian prelegvojaĝon!

Dietrich WEIDMANN, kunprezidanto de SES
concours@concours-esperanto.ch

Usono

En la paĝaro de *Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo (http://www.iĉlm.org)* estas libreto kiu havas unu kolorigeblan paĝon por ĉiu litero de la alfabeto: *http://www.iĉlm.org/abc*. La vortoj estas: arbo, birdo, cirklo, ĉevalo, domo, elefanto, fiŝo, gitaro, ĝirafo, hundo, infano, jako, ĵipo, kato, libro, mano, nesto, ombrelo, pomo, roboto, stelo, ŝuo, tablo, urbo, vagono, zebro.

Estas ankaŭ kolora karto kun la alfabeto kaj alia karto kun 10 numeraloj: *http://www.iĉlm.org/abc/litero01.htm*. Eblas presi la kartojn kaj tondi kartetojn por ĉiu litero, aŭ numeralo. La vortoj estas: aŭto, balono, citrono, ĉevalo, domo, erinaco, flago, gitaro, ĝirafo, hundo, ĥameleono,

insulo, jodo, ĵurnalo, kato, lupo, monto, najlo, ombrelo, pano, robo, skarabo, ŝipo, tondilo, urso, vulpo, zebro.

En ĉi tiu retejo estas kelkaj aliaj libretoj por infanoj, kaj ankaŭ por komencontoj. Kelkaj havas anglajn klarigojn aŭ hispanajn klarigojn, sed plejmulte ili estas en Esperanto, kun multaj desegnoj faritaj de infanoj.

Informis: Enrique ELLEMBERG, Fremont, California, Usono
http://esperantofre.com; <eenrike@gmail.com>

NASK 2007-2008 en Kalifornio

„*California, here I come, Right back where I started from*" („Mi revenas al Kaliforni', al la lok' kie startis mi.") Ĉi tiu frazo el malnova usona popolkanto povus esti la temo de la ĉi-jara NASK-o (Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto). Antaŭ 38 jaroj, NASK komenciĝis ĉe la Ŝtata Universitato de San-Francisko. Ĝi translokiĝis en 2001 al la Alt-lernejo de Internacia Trejnado (*School for International Training*) en Vermonto kaj ĉi-jare revenis al Kalifornio. Anstataŭ la nebuloj de San-Francisko, la partoprenantoj estis benitaj per la bluaj ĉieloj kaj blua maro de sunriĉa suda parto de la ŝtato ĉe la Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD). Partoprenis 24 lernantoj, ĉefe de Usono sed ankaŭ de Makedonio, Germanio, Japanio, Irano kaj Kanado.



El la 5 eblaj niveloj de E-instruado ĉe la universitato, lernantoj povis elekti inter du niveloj ĉi-jare: meza kaj supera. Ambaŭ studprogramoj emfazis la aktivan uzadon de E-o. La vivo kaj verkoj de *William AULD* ĉefrolis en la supera kurso sub la gvido de d-ro *Paul GUBBINS* (Britio) kaj estis parto de la studmaterialo en la meznivela kurso de *Lee MILLER* (Usono). *Tim WESTOVER* (Usono) revenis kiel redaktoro de la studenta ĵurnalo, la NASKa Fasko kiu enhavis la artikolojn, poemojn kaj eĉ ŝercdesegnaĵojn de la lernantoj (vidu ĉe: *http://www.literaturo.net/naskafasko/2007*). *Tim* aranĝis ankaŭ vesperajn programojn kaj ekskursojn al interesaj apudaj vidindaĵoj (la plej ŝatata estis la marbordo, kiu estas tiel proksime ke oni povas atingi ĝin piede.) Pro la fakto ke la partoprenantoj loĝis kvarope en la apartamentejo Internacia Domo, manĝis en apuda studentmanĝejo, frekventis la kursojn en la mateno, ekskursis aŭ aŭskultis prelegojn en la posttagmezo, vespere aŭ semajnfine, ili povis perfektigi sian E-on la tutan tagon. Multe helpis la lokaj e-istoj kiuj ne nur vizitis dum eksterprogramaj horoj sed ankaŭ helpis veturigi la kursanojn diversloken. Tuj je la fino de la sesio, preskaŭ duono de la partoprenantoj iris al Tijuano, Meksiko, por la usona landokongreso kun meksikaj aktivuloj.

NASK 2008 okazos denove ĉe UCSD, kie tri kursoj haveblos: post-baza, progresiga kaj supera. La instruistoj: *Lee MILLER* (post-baza), *Birke DOCKHORN* (progresiga), *Bertilo WENNERGREN* (supera). Datoj: 30 junio-18 julio. Detaloj: *http://esperanto.org/nask/* aŭ *Ellen M. EDDY, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 Usono, <eddyellen@aol.com>*

Reago (al la artikolo de Rob MOERBEEK en IPR 07/4, p. 17-19.)



Kara sinjoro MOERBEEK, nepre sendu pliajn similajn ekzercojn al samideano Németh por publikigo. Ili estas bonegaj. Jen miaj komentoj pri kelkaj frazoj:

2) Ĉu la nocio estas konata *al* vi? (mi uzas „*al*”; komparu en PIV: *Al* neniu klera homo la nomo de nia afero nun estas jam nekonata. (Zamenhof)

5) Mi ne dirus „samkiel”, sed „same kiel”. „Samkiel” mi tolerus nur en poezio.

7) „Malbonfartigis” estas tro longa verbo. Mi dirus: „Ŝi malbone fartis pro la ondoj.”

21) La frazo „La blankuloj venis por (= kun la intenco) *koloniigi* niajn prateritoriojn” estas senerara.
Sed: „La blankuloj koloniis la landon, la regionon” signifas, ke ili establis/fondis kolonion tie. Mi scias, ke la verbo „koloniigi” ne troviĝas en la nova PIV.
26) La esprimo „mi ne aŭdis de vi” malplaĉas al mi. Mi preferas „vi ne diris al mi”.

Josef SCHIFFER[2]

Por via notlibro

Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj

(El la Antaŭparolo por la esperantlingva eldono)

Eŭropa Referenckadro en Esperanto – Esperanto en Eŭropo

Meze de decembro finpretiĝis la esperantlingva traduko de grava lingvopedagogia verko de la Konsilio de Eŭropo. La resuma verko „Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado” celas en travidebla kaj kohera maniero subteni lingvolernantojn, lingvouzantojn kaj instruistojn ĉe la difinado kaj atingado de siaj celoj. La ellaboritaj taksosistemoj ebligas unuecan mezuradon de lingvaj kapabloj, kun travideblo kaj internacieco, kiu faciligos kompari lingvokonojn en diversaj landoj kaj pro tio servas kiel bazo de la ekzamensistemo de UEA-ILEI. La akreditigo de tiu novtipa ekzameno nun okazas ĉe ALTE[3].

---

[2] *Josef SCHIFFER* naskiĝis en 1939 en la germana Nordrejn-Vestfalio. Li studis en la universitato de Kolonjo kaj fariĝis anglisto kaj romanisto, instruisto en mezgrada lernejo por la angla kaj franca kaj poste fakinstruisto por la angla en faklernejo. Li estas e-isto ekde 1977 kaj fondinto de la E-grupo de *Villingen-Schwenningen*. Ekde la komenco li gvidas la E-kursojn de ĉi tiu grupo kaj evoluigis metodon de gvidata memlernado konatan kiel "Metodo Ŝifro". Li instruis E-on dum multaj E-seminarioj, kiujn li plejparte ankaŭ organizis. Kiel ekzamena komisaro de la Germana E-Instituto li preparis kaj gvidis lingvajn ekzamenojn. Li aktivas en la estraro de BAVELO (Baden-Virtemberga E-Ligo). – NdlR

[3] Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo

La unuaj tiaj ekzamenoj estas planataj por la dua parto de 2008. La Referenckadra projekto disvolviĝis sub la gvido de la porinstruista retejo www.edukado.net. La diplomatian kaj organizan laboron plenumis *Katalin KOVÁTS*, kiun helpis en diversaj fazoj de la laboro *Sylvain LELARGE*, *Osmo BULLER* kaj *Renato CORSETTI*. La tradukinto *Roel HAVEMAN*, dum monatoj per persista kaj diligenta laboro, esperantigis la dokumenton. Por la traduko de la Referenckadro kolektiĝis fakaj terminoj, kiuj, post la publikigo de ĉi tiu esperanta versio, estos norme sekvindaj kaj aplikindaj en ajna ekzamensistemo ene de Esperantio. Dum la tradukado *Roel HAVEMAN* zorge kompilis ankaŭ librofinan indekson, kiu estas la plej riĉa indekso de la ekzistantaj Referenckadro-versioj.

En la kontrolo de la 262-paĝa dokumento partoprenis multnacia provlegantaro: *Marc BAVANT*, *Ranieri CLERICI*, *István ERTL*, *Katalin KOVÁTS*, *Rob MOERBEEK* kaj *Brian MOON*. La kovrilo de la eldonaĵo estas kreita de *Francisco L. VEUTHEY*. La E-traduko de la Referenckadro baldaŭ listiĝos sur la oficiala retejo de la Konsilio de Eŭropo kiel la 32-a versio apud 31 nacilingvaj tradukoj.

La traduklaboron financis *Esperantic Studies Foundation (ESF)* kaj la donaco de la *Fondaĵo Saliko* estas uzata por eldonaj kaj organizaj kostoj.

La libro estas elŝutebla el la retejo *www.edukado.net*, kaj multobligebla por nekomercaj celoj. Ĉe la Libroservo de UEA fine de januaro kontraŭ produktokostoj akireblos multobligitaj ekzempleroj, kiuj bone povas servi kiel informmaterialo donacota al bibliotekoj kaj al landaj edukinstancoj.

Kun la espero ke per tiu ĉi laboro la teamo kontribuis al pli kvalita kaj pli moderna instruado de la internacia lingvo, al pli sistema kaj internacie normigita pritaksado de niaj lingvokapabloj[4], kaj al la akceptigo de E-o kiel socikultura kaj lingvopolitika fakto, eŭrop- kaj mondnivele, jene ni donacas ĝian rezulton al ILEI kaj al la uzantoj kaj instruantoj de la internacia lingvo tutmonde. Apliku ĝin flekse por pluiri la komencitan vojon.

Katalin KOVÁTS,
redaktoro de www.edukado.net, gvidanto de la Referenckadro-projekto

[4] TORPEDo-3 (Tutlanda Oktobra Renkontiĝo Pedagogia) 2-5 oktobro 2008 en Herzberg, Germanio. Novtipaj ekzamenoj laŭ la Referenckadro en niveloj A-B-C, postularo, modeltestoj, trejnado de ekzamenantoj – estos unu el la ĉeftemoj. Interesiĝantoj, partoprenontoj bv. kontakti: ICH, <esperanto-zentrum@web.de>, Zsófia KÓRÓDY

Ateliero okaze de la ILEI-Konferenco en Portonovo

La celo: verki libreton uzeblan en E-kursoj en Afriko laŭ la spirito de la Speciala Projekto DANIDA-UNESKO (verkoj de afrikanoj por afrikanoj en la kadro de la Neformala Edukado, konsiderante edukadon post alfabetiĝo, solvon de diversaj ĉiutagaj problemoj kaj egalecon de la seksoj). Post traduko la libreto povus perfekte integriĝi en la ekzistantan serion.


La problemo: miloj da mortoj de infanoj en iuj regionoj de Afriko pro nura manko de provitaminoj *A* facile troveblaj surloke en plantoj kiujn tradicioj malhelpas manĝi.

Nia kontribuo je unu solvo: la verkontoj de tiu libreto devos imagi simplan rakonton (kun ilustraĵoj), konvinkonte la virinojn preteriri antaŭjuĝojn kiuj malutilas al iliaj infanoj, kiel ekz. „manĝado de citrono detruas la stomakon", kaj konsekvence elekti nutradon sen manko de vitaminoj.

Organizo: libere elektebla aliĝo por ĉiu partoprenonto de la Konferenco. Prezento de la ateliero kaj de ties laboro okazos je la komenco kaj fino de la konferenco.

Por ricevi pliajn informojn aŭ kunlabori en la preparlaboroj bv turni vin al *Jean-Pierre BOULET, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60, <bouletjeanpierre@freesurf.fr>*.

Ekzercoj por kursgvidantoj



Pasintjare aperis ĉe FEL legolibro *Nemave edifi* de *Stefan MACGILL*, siatempa prezidanto de ILEI. Ĝi prezentas kvar teatraĵojn, prozaĵon kaj poemon. La libro prezentas ankaŭ ekzercojn, demandojn kaj rolludojn por suplementi la legaĵojn por ke ili estu uzeblaj en kursoj aŭ por memstudo. Nun ekaperis ĉe *edukado.net* respondoj por ekzercoj aperigitaj en la libro kaj laŭscenaj resumoj de la teatraĵoj, por ke gvidantoj rapide akiru superrigardon de la prezentota materialo. Troveblas rete ankaŭ rolludoj, demandoj kaj respondoj por ĉiu sceno; baldaŭ aperos konsiloj al gvidantoj kaj pliaj ekzercoj, neprezentitaj en la libro.

Vidu ĉe: *http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#19606.*



Juna amiko en 2008

La revuo aperos ĉi-jare same kiel en 2007: trifoje, ĉiam kun 52 paĝoj. La tarifoj restas senŝanĝaj.

	1 ekz.	Ekde 3 ekz.
Tarifo 1	EUR 14	po EUR 11
Tarifo 2	EUR 9	po EUR 7

Perantoj en tridek landoj akceptos abonojn, kun grandaj rabatoj por kvantaj liveroj.

La revuo plu raportos pri la kunlaboro kun Interkulturo, AKEL, Lingvolanĉilo kaj similaj projektoj. Ĵus aperis numero 2007/3, kaj ĝi estas nun ekspedata.

Konkurso por Konferenco 2010!

Kie ILEI konferencos en 2010? – ankaŭ Vi povas helpi la decidon!

ILEI-konferenco povas okazi ĉie, kie estas aktivaj esperantistoj! La estraro de ILEI alvokas Vin al konkurso: Lanĉu la ideon en Via lando, en instruista rondo. Ĝuu internacian aranĝon en propraj lando, urbo, klubo – konatigu ilin al monda esperantistaro, kaj partoprenu ĝin preskaŭ senkoste!

La landaj sekcioj de ILEI povas konkursi por la aranĝado de la ILEI-konferenco en 2010. Multaj E-aranĝoj por la sekvaj kelkaj jaroj jam estas planitaj: Ekz. UK en 2009 okazos en Bjalistoko (25 julio – 1 aŭgusto). Ankaŭ por UK en 2010 jam estas kandidatoj kaj TEJO jam lanĉis konkurson por IJK en 2009.

En 2008 ni konferencas en Portonovo (Benino, Afriko, 29 julio -5 aŭgusto) tuj post UK (informoj en IPR kaj ĉe *www.ilei.info*).

En 2009 ni konferencos en Maribor (Slovenio) fine de julio, antaŭ UK. Pliaj informoj aperos en IPR kaj la retpaĝo de ILEI – bonvolu regule viziti ĝin.

Post Azio kaj Afriko indus esplori aliajn mondopartojn. Se en via lando estas aktivaj esperantistoj, se vi ŝatas instrui, organizi, gastigi

internacian aranĝon, se vi volas informi pri la utilo de la internacia lingvo, invitu ILEI-konferencon! Vi povos profiti ankaŭ de la Lingva Festivalo kaj Simpozio.

Bv. sendi vian proponon ĝis la 30-a de majo 2008 al estrarano pri konferencoj: *Aida ČIŽIKAITĖ, Kapinių 11-15, LT-50189 Kaunas, LIETUVA, mob. +43 664 3682299, au aidute@mail.lt.*

La estraro esploros Vian proponon kaj informos pri la decido ĝis fino de junio 2008. Por priskribi la proponon, bonvolu uzi informilojn, kiuj aperas en IPR aŭ retpaĝo de ILEI kaj nepre konsultu la Konferencan regularon: *http://www.ilei.info/dok/regularo_konferencoj.rtf.*

La celo estas sufiĉe frue anonci pri la elektitaj loko kaj dato por povi tre bone pretigi la konferencon, por allogi kiel eble plej multe da partoprenantoj, por fari nian konferencon ŝatata kaj prestiĝa E-aranĝo, al kiu kunvenu ne nur instruistoj kaj instruantoj, sed ĉiuj lingvemuloj.

Atendante Viajn proponojn
Estraro de ILEI

Atentigo pri medikamento

Ermanno TARRACCHINI (IT) estas pedadogo en ŝtata mezlernejo de la itala urbo Modeno kaj docento en la universitato de Modeno/Reĝo-Emilio pri la kvalifikigaj kursoj por la akiro de la instrukapableco favore al tielnomataj „alikapablaj" gestudentoj. Li estas konstatanta ke ĉiam pli ofte senskrupulaj psikiatroj preskribas al infanoj iomete pli "malatentaj" la pilolon *Ritalin,* kiu devus efiki kontraŭ tiu ĉi „hiperaktiveco pro nesufiĉa atento". Tamen oni ne scias ĉu la "bebo-piloleto" trankviligas aŭ ruinigas la infanojn. El Usono intertempe venas alarmo pri la eblaj flankaj efikoj kiel korproblemoj kaj emo al sinmortigo.



Jen intervjuo de la itala ĵurnalo „La Stampa" aperigita la 10-an de marto 2007:

„*Oni kuracu per amo kaj per pedagogio, ne per medikamentoj*", substrekas la itala instruisto.

Profesoro Ermanno Tarracchini, vi estas biologo kun kvalifiko pri farmakologio kaj helpinstruisto, en Modeno. Vi aperigis plurajn raportojn kontraŭ tiuj ĉi medikamentoj. Kial?
„Kelkaj diagnozoj koncernantaj certajn deficitojn estas realaj, kiel la surdeco, la blindeco, la sindromo de Down…ktp…
Aliaj, kiel ekzemple tiuj, kiuj rilatas al la tiel nomita deficito de atento, estas objekto de diskuto. Mi opinias ilin senvaloraj etikedoj, ili kamuflas la efikojn de la malfacilaĵoj de la vivo de la plenkreskuloj sur la infanoj".

Ĉu vi havis rektajn spertojn pri hiperaktivaj infanoj?
„Jes".

Ĉu veras, ke ilia nombro estas kreskanta?
„Mi vere ne kredas tion. Ili estas etuloj pri kiuj iam oni diris, ke ili enhavas vivantan arĝenton, kiel ŝtormaj friponetoj (itale: Ĝamburaska). Hodiaŭ, pro tiu medicina trudado, ili ekfariĝas malsanuloj. Multaj aspektoj de la ĉiutaga vivo, cetere, estas patologie ligitaj".

Kiel vi sukcesis helpi al viaj ŝtormaj friponetoj?
„Antaŭ ĉio pensante, ke ili ne estas malsanaj, sed ofte rezultoj de ne adekvata edukado. Ĉefe pro manko de aŭskultado, pro tro da aŭtoritatismo aŭ da permesivismo. Mi eksperimentis klasasembleojn, kiuj helpas al ili respekti la tempojn de aŭskultado kaj de dialogo. Mi ekspluatis la potenzialon de la teatro, de la muziko kaj de la danco.
Tamen, pli multe ol tio, mi konsciiĝis, ke tiuj infanoj havis malsamajn neŭropedagogiajn bezonojn, aspektojn kiuj devas deiri de la moviĝo. Laŭ la spuroj de tiuj ĉi observadoj la rezultoj estis bonegaj. Mi memoras iun knabinon kun apartaj malfacilaĵoj: nun ŝi ne plu estas "malatenta kaj hiperaktiva" kaj la transformiĝo okazis en tri jaroj sen *Ritalin*, nur dank' al sociaj kaj pedagogiaj instrumentoj, donantaj al ŝi pli grandan atenton kaj aŭskultadon deflanke de la plenkreskuloj, de la geinstruistoj, de la gepatroj kaj de ŝiaj samklasanoj".

Longa kaj streĉa laboro...
„Nu, jes ja, tiu estas sinengaĝa sinteno. Ĉar la instruisto devas bonege prepari la lecionojn kaj doni grandan atenton al la tempoj kaj al la ritmoj laŭ kiuj li intervenas. La malgranda pilolo estas sendube vojo pli facila. Sed, krom ne solvi la problemon, ĝi povas postuli tre altan koston".

Daniela DANIELI, Romo

LABORKOMISIONOJ

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto); Boris Grigorjeviĉ Kolker (Vicprezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár
Elekta: Tieko Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrola: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Tieko Isikawa, Luigia Madella, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Beloŝeviĉ, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Maŭro La Torre, Miroslav Malovec

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, *cantskog@kolumbus.fi*
E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, *www.ikso.net*): faka sekcio de **TEJO** (*www.tejo.org*, poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj):*
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, *esperanto@Education.monash.edu.au*
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.*
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **François Hounsounou** (adr. sur p. 40., Benino)**.**
UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI**: François Lo Jacomo**, *72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr*; **Monique Arnaud**, *Ecole Chemin de l' Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr*; **Jean-Pierre Boulet**, *17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60*; **Mireille Grosjean**, *Temple 20 pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88*, *mireille.grosjean@rpn.ch*

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGADO POR ALIAJ SERVOJ

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, *Tråddragargatan 27D, SE-723 37 Västerås, Svedio. Tel.: (+46 21) 41 70 45, sjoerd@esperanto.se*.
La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.
* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).
* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.
* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.
Hejmpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIĘBA*, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*.
Presado: Flandra Esperanto Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen, tel: (+32-3)-234 34 00.*
Redaktejo: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*. Rete: <*jozefonemeth@yahoo.com*>, *http://www.ilei.info/ipr/;* tel*: (+36-89) 356-050.* La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj.
Informas: Rob MOERBEEK*, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <*r.moerbeek@wanadoo.nl*>.

SEKCIOJ

Albanio: Vasil Pistoli, c/o Bardhyl Selimi, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, AL-Tirana, *selimibardhyl@yahoo.com*

Aŭstralio: Penny Vos, 14 Candelo St, AU-2550 Candelo NSW, *penivos@yahoo.com*

Belgio: Iwona Kocięba, Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem, *iwona.kocieba@telenet.be*

Benino: François Hounsounou, BP 226, BJ-Lokossa-Mono, *hounfranc@yahoo.fr*

Brazilo: *vakas geinstruistoj@ileibr.org*

Britio: Tellier Angela, 10 Marina Gardens, GB IP11 2HW Felixstowe, Suffolk, *angela@esperantoeducation.co.uk*

Ĉeĥio: Jana Melichárková, CZ-696 02 Ratíškovice 938, *melicharkova@quick.cz*

Ĉinio: *vakas*

Danio: Arne Casper-Mortensen, Bryggervangen 70, 4. tv. DK-2100 Kobenhavn, *arnecasper@dbmail.dk*

Finnlando: Carola Antskog, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito *cantskog@kolumbus.fi*

Francio: Michel Dechy, 65 allée de la Crémaillère, FR-59650 Villeneuve d'Ascq, *michel_dechy@hotmail.com*

Germanio: Zsófia Kóródy, E-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, *zsofia.korody@esperanto.de*

Hungario: József Németh, Fő u. 41/5, HU-8531 Ihász, *jozefo.nemeth@gmail.com*

Irano: Hamzeh Ŝafii, P.O. Kesto 17765-184, IR-Teheran, *hamzeh@esperanto.org*

Italio: Luigia Oberrauch Madella, via Prampolini 8, IT-43100 Parma, *silkovojo@aliceposta.it*

Japanio: Isikawa Tieko, 103, Tate 1-6-6, Siki, Saitama JP-353-0006, *isksanjo@ff.e-mansion.com*

Katalunio: Pedro M. Martin Bututxaga, Arnau Gatell 2-4-2, ES-17300 Blanes, *pmarti10@xtec.cat*

Korea Resp.: CHO Sung Ho, Department of Biology, Inha Universitato, Incheon KR-402-751, *shcho@inha.ac.kr*

Kroatio/KEL: Marija Jerković, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, *mjerkovic@net.hr*

Kroatio/KEU: Ivan Bekavac-Basić, Kuŝlanova 59, HR-10000 Zagreb, *ilei@hes-keu.hr*

Kubo: Marta Alonso Gutiérrez, Malecón 659 entre Belascoaín y Gervasio; CU-10200 Ciudad de La Habana, *kubesp@enet.cu*

Nederlando: Atilio Orellana Rojas, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, *iesperanto@versatel.nl*

Norvegio: Anne-Karin Bondhus, Gjerdeveien 157, NO-4028 Stavanger, *akbondhus@c2i.net*

Pollando: Piotr Nosek, ul. Zbrojów 10/8, PL-30 042 Kraków, *piotr.esp@gmail.com*

Rumanio: Mihai Trifoi, Str. Principala Bl.1 Ap.3, RO-527116 Bixad/Jud. Covasna, *trifoi@honoris.ro*

Rusio: Irina Gonĉarova, Moloeznaja 38-10, Odincovo 2, Mosk. obl. RU-143000, *mirina@online.ru*

Svedio: Siv Burell, Lekstorpsv. 46 E, SE-443 41 Graabo, *siv.burell@telia.com*

Svislando: Mirelle Grosjean, Grand-rue 9. Pf. 9, CH-2416 Les Brenets, *mireille.grosjean@rpn.ch*

Togolando: Attiogbe-Agbema-don B., Mensah, T.I.E.To, B.P. 13169, Lome-TOGO, *esp.togo@cafe.tg*

Ukrainio: Nina Daniljuk, prospekt Sobornosti 32-108, UA-43026 Luck-26, *nina_daniljuk@ukr.net*

Usono kaj **Kanado:** Doroteo Holland, 5140 San Lorenzo Dr, Santa Barbara, CA 93111-2521 (US), *dorothyh77@gmail.com*

Venezuelo: *vakas*

REPREZENTANTOJ

Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv.52, AM-375062 Erevan, *LIDELB@freenet.am*

Barato/Hindujo: Venkatesh Reddy, No. 216, Off main Road, Whitefield, Bangalore 66, Karnataka, *esperovr@yahoo.co.in*

Bosnio kaj Hercegovino: Nimeta Kulenoviĉ, Branica Sarajeva 15/V, BA-71000 Sarajevo

Ĉilio: Héctor Campos Grez, Casilla 903, CL-3340000, *hecg@uea.org*

Estonio: Helgi Hromova, Pk. 623, EE-12602 Tallinn

Islando: Loftur Melberg Sigurjónsson, Traðarberg 13, IS-221 Hafnarfjörður, *loftur@skyrr.is*

Israelo: Gian Piero Savio, 13/4 Menora-str. IL-53490 Givatajim, *saviogp@zahav.net.il*

Kongo DR: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P.13, CD-Lukala, Bas-Zaïre

Kostariko: Hugo Mora Poltronieri, Apartado 4981, CR-1000 San José, *tikoguau@gmail.com*

Litovio: Algimantas Piliponis, Kavoliuko 3-93, LT-04325 Vilnius, *piliponis@centras.lt*

Meksiko: José de Jesús Corrales C., Belice 116, Fraccionamiento Guadalupe, Durango, Dgo. *jdjcorrales@yahoo.com.mx*

Nov-Zelando: Gwenda Sutton, 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, NZ-6001 Wellington 1, *gwenda.s@ihug.co.nz*

Portugalio: *vakas*

Serbio: Radojica Petrović, Bul. oslobodjenja 36, RS-32000 Ĉaĉak, *radp@ptt.yu*

Slovenio: Marija Zlatnar-Moe, Miliĉinskega 66, SI-1000 Ljubljana, *Marija.Zlatnar@guest.arnes.si*

Uzbekistano: Eugeno S. Perevertajlo, Abon. jashik 140, Poĉtamt, UZ-700000 Taŝkento, CIS, *esperuzo@mail.ru*